DOKUMENTOJ

PRI LA

IBERIA E
S
P
E
R
A
N
T
O
D
A
V
O
— M

en madrido, la 23-an de aprilo de 1989, tagon de sankta georgo, simbolo de kavaliroj kaj aliaj enamiĝintoj luktantaj kontraŭ plej diversaj drakoj...

ĝis tiu ĉi momento (pasko 1989 post kristo, 102 de esperanto) nur 133 numeroj aperis de hejs-juneco. ili estas ia spegulo, bildo de parto de la agado, esperoj, aspiroj, de iberiaj junaj esperantistoj dum la lastaj preskaŭ tridek jaroj...

finfine aperis, eltroviĝis manuskripto de numero neniam aperinta: 134. ĝi mem klarigas sin kiel atestaĵo pri tio, kiel povas detruiĝi projekto kaj komenco de esperiga laboro pro sintruda interveno de regemaj manoj, kiuj nur difektas sen konstrui, altrudante mortigan unuanimecon al pluranima vivanta homaro, ĉu cele al tomb(ec)a paco?


eble la homo lupas la homon; mi ne scias. sed mi ja scias, ke unu homo povas rompi kaj disbati rapide kaj senrevene kion multaj homoj sukcesis ekfari nur post longa penado kaj stumblado. jen do unu plia kazo, kiu povus pensigi, ĉu eble la homaro konsistas, laŭ praktiko aŭ konduto, el trankvilaj, pacamaj ĝuantoj de la vivo, unuflanke, kaj apude pikantaj blinduloj, suferantaj suferigantoj, sklavoj de la pasio ĝuadi kontraŭ aliaj, ne kun ili?

sed mi jam finu! ĉu sokrate-maniĥee-dualisme-disduisme, do grince - ĉu monisme-unuisme-eĉ plurisme-kunvivisme - ĉu mon-isme, ĉu ajnisme,... nu, kiel ajn estas, mi esperas, ke vi ĝuos la legadon, kontakti kun-homojn, ekzisti kaj tielpluelplui

skeptike sincerajn salutojn de

la trovinto.

notu bone: pro la dokumenta karaktero la numero aperas kiel trovita, sen ia ajn ŝanĝo, ĉu lingva, ĉu aspekta, ĉu enhava.




*ZOMBIO: VUDUE REVIVIGITA MORTINTO.

# HEJS JUNECO

Hispana Esperantista Junulara Societo (H. E. J. S.)

N-ro 134



# ADRESOJ

– PROVIZORA PAĜAĈO –

## Federaciiĝintaj Asocioj

√ Andaluzia Esperanto-Junularo
Apdo. 611·14080-Córdoba
Andalucía

√ Junulara Esperantista Societo
Aragona
Apdo./ Trest. 149
50080-Zaragoza
Aragón

√ Madrida Esperanto-Junularo
Atocha, 98-4º
28012-Madrid
Castillas y León

√ Mediteranea grupo JUNA SUNO
(Che la kunordiganto)
Pedro Macanas Valverde
Av. Libertad, 6
39009-Murcia
(tiu grupo reprezentas
Murcia kaj País Valencià)

√ Alava Esperanto Asocio
Domingo Beltran-kalean,42 4º
01012-Gasteiz
Euskalherria

√ Faka sekcio de HEJS en de KEJ
(secció de HEJS a KEJ)
-serĉatas precizan nomon-
Apartat 407 , Sabadell
(Vallès Occidental)
Catalunya

## Hispana Esperantista Junulara Societo (H. E. J. S.)

### Centra oficejo

SOL, 75
E - 41003 - SEVILLA
ANDALUZIO
TFNO (954) 415991

### Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

NIEUWE BINNENWEG , 176
3015 bj Rotterdam
Holland



ĈIU NUMERO, VI TROVOS TIE ĈI (EBLE ALILOKE) IU RAPORTETO PRI E-ORGANIZOJ. TIU ĈI FLANKA, TEMAS PRI LSG. ĜOJU DO PER TIU NOVA H-J.
FELIP '88

## LSG

Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj
(ĉe Peter Danning)
G/F, 68 Church Road
Richmond -Britio, TWID 6LN-

LSG (Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj) celas laŭ ĝia statuto krei internaciajn rilatigojn inter LSG-anoj, disvastigi E-on, enmeti plenan integriĝan gejecon en la socio, labori por forigo de la lingva diskriminacio, informante pri la lingvo-problemo kaj ĝia solvo per E-o en gejaj medioj, labori por fortigo de kontraŭgeja diskriminacio, informante pri la signifo, valoro kaj problemoj de gejeco en la E-medio. LSG eldonas dumonatan revuon nomiĝita "Forumo".

## Revuoj

HEJS-JUNECO
(ĉe Felip Artoro i Lozano)
C/Felip Beltran i Güell,5
E-08027 · BARCELONA

LA MANO
(ĉe Jorge Camacho Cordón)
C/Chantada, 43 1-J
E-23035 MADRID

# FAJFI PRI ILI...



Se tiu ĉi 134-a numero de HEJS-Juneco


Se tiu ĉi 134-a HEJS-Juneco alvenas malfrue ĉe vi, Kulpas pri kelkaj kaŭzoj: kataluniaj balotoj; miaj Lernejaj Ekzamenaĉoj, kaj la 12-a HEJS-Tendaro...

Mi bedaŭras ke la HEJS-Estraro elektis min kiel redaktoro de H-J (HEJS-Juneco) pro la kabeo de Jesuo Armangol (pri tio legu sur 10-a paĝo), sed pensu ke eble, mia redaktora stato malmulte daŭros pro diktatoreca maljuna "imperiismo" sur HEJS.

Malgraŭ ĉio mi havis du elektvojojn: ĉu akcepti la junajn ordojn aŭ la maljunajn; sen dube mi elektis unuan.

HEJS eklaciĝas pri tiuj estranaraĉoj, kiuj foje oni povus defini ilin kiel vulturoj, fasiŝtoj, viristoj...

Ni luktos por nia volonta memstareco, kaj se endas necese, ni fajfos pri kiuj fajfas pri ni.



ENIRU!

NOTO: MI KREDIS KE TIU CI REVUO DEVIS ESTI DEDICITA AL LA 12-a HEJS-Tendaro, MI SINCERE BEDAURAS KE CERTE VI NE VENIS, SED P(L)URAJ GEULOJ KONSILIS AL MI PRI TIU SPECIALA TEMELEKTO.

Do ĝoju per tiu n-ro de HEJS-Juneco, kaj ĝis la !

Felip Artero i Lozano —▷
(REDAKTORO DE HEJS-JUNECO)






# CIUJ NI EN LA 12a HEJS-TENDARO

tiu 12-a hejs-tendar' jam ankoraŭ vivas en nia memoruj', sed jam ne plu estas. Ridegoj, dancoj, malord'...ĉio revenas ĉe nia kap', pri tiu renkontiĝ' ;

andaluzoj, katalunoj, vaskoj, kastilianoj, eksterŝtatanoj, aragonanoj ...ĉu vi rememoras? ĉiuj en monistrol...kataluni'....

ĉu vi rememoras eĉ la lastan programeron? (sed...ĉu vere estis ie program'?), matene -iuj- je la duŝoj, aliaj en la trinkej' de la centra plac', verda estas la polic', la monistrolaj viroj, la monistrolaj virinoj (kie? mi ne vidis !), la domo, la spiritisma rond', la drinkuloj, la tendoj, la formaĝetoj "La vaca que ríe", la cigaredoj de flartabak' kaj haŝiŝaj, la fi-vortar' pri fivortoj (P.I.F. -Plena Ilustrita Fivortaro- ) kiu aperados en hejs-junec', Gorgorito (kiel ne !), la ekskursoj, la eks-kursoj, la ul' de amnesti' internacia, la naĝej', la naĝantoj, ....tiom da aĵoj kaj tiom da uloj kiel ekzemple Isabel,Xabi,Adolf,Judit,Jon,Antxón,Matt,Jesuo,Juanma,Natxo,Karol, Blanka I,Blanka II,Cecilia,Ferriol,Rakel,Josebángel,la tri getaragonanoj (pardonu...mi ne rememoras viajn nomojn !),Felip,Antonio,Gonçalo ( ah caralho !),Juan Carlos,Vicente,Rafa,Iñaki,Ricardo-Felipe,Alberto,Jordi F, Javier Fdez,Marina....ĉiuj sub la sankta kaj verda signo de la espero...ha,ha,ha...kiu ega stultaĵo!!!

Ne Hezitu, Kaj Tiuj Kiuj Ne Ĉeestis Tendaren,La VenontanIru Vitorien (Aŭ Gastejcen).Kiam Oni Sciu Ion Pri La 13-a HEJS-Tendaro Mi Informos Vin.

...ías, la
...e este enorme
...uato, éste
... al otro aspirante,
el de más allá se mete con
la madre de aquel presi-
denciable...

...epublicano
sorprendido la caída
del general Tom Defolia-
tor, hombre curtido en la
guerra de Indochina que
preconizaba la recon-
quista del sueño ameri-
cano.

...candi-
...s republicanos
...cien reunirse en esta-
blos y los compromisa-
rios se emborrachan por
espacio de dos semanas.
Cuando se les pasa la re-
saca, el primer nombre
de aspirante que se les
viene a la cabeza es el
que van a votar.
Los demócratas cele-

...nsiga des...
... a todos los jinete...
que intenten domarlo, s...
le ata a un poste situad...
en medio de la pista. Lue
go se pintan los nombre...
de los candidatos alrede...
dor del poste. Acto segu...
do, se aplican guindilla
en el trasero del animal
se espera a que deje d...
correr. El aspirante cuy...
nombre quede más cerc...
del lugar donde se pare ...
animal es el elegido.

# KATALUNECO...



NE TIOM HALUĈINU!!!






...kiu dubas pri la tendara kataluneco ? Do, prave, en tiu tendaro oni beste bone konstatis kie okazis tiu evento, ĉu per sukcesaj kursoj pri sardanoj, kolokvetoj (nokte je la kuirejo), kaj ankaŭ iumaniere la malinstruado pri kataluna lingvo, malgraŭ ke la suk-seksis la kataluna lango. En la venonta ni parolu pri vaskeco

↑ VIDU MIKSAĴON INTER "MORENETA" KAJ "MACARENA". (ALBERTO FRANCO, LA ANDALUZKATALUNO). ANKAŬ LI ESTAS LA ZUNEULO.



← ĈIUJ DANCANTAJ SARDANOJ; SED LAŬ GONÇALO POVIS ESTI SARDA-ANOJ *




↑ KOMPRENEBLE, KATALUNE !

JO ESTIC
TU ESTÀS
ELL ESTÀ
NOSALTRES ESTEM
VOSALTRES ESTEU
ELLS ESTAN

JO SÓC
TU ETS
ELL ÉS
NOS. SOM
VOS. SOU
ELLS SÓN

* "SARDA" PORTUGALE SIGNIFAS KAĈO.


AM-UZE...
* LAŬ MI AM-UZO KAJ AMUZO ESTAS SINONIMOJ...
GORGORITOAK EZ, EZKERRIK ASKO!
KIOM DA MAL-VARMO KOJONOJ!
EĈ PLI BONE A.EA
A.E.A
AAAAAAA
PAF!
GORGORITO'S MI MORTIGOS VIN !!!
MONISTROL
TUJ
TUJ
TUJ
TUS
TUJ
BONVOLU! NE PLU PAROLU PRI LA KATALUNA E-MOVADO! -ONI PETAS-
KIOM DA INTERNACIECO!
ESPERKATO

# ...BONEGE!







...ONI INVITIS ZAMENHOFF!!! SED LI NE VENIS...





Al S.A.

Feroĉas Ŝakal' ĉe la karno
kaj grakas vultur' al manĝvermo
kaj l' Ŝarko teruras
kaj same vi bruas
pledante por JEKA kun larmo

Hektor Alos i Font
(88/5/14)








# DRINKI...

....drinki, drinki, drinki....

...eč la lastan guton da biero

čampano, vino, rumo, DRINKI :

la sinteno !

Bierumi por travivi, alkoholuloj

al la registaro !

Sen biero ne eblas revolucio !

(Ni speciale dankas al la firmaoj

Codorniu kaj Damm pro siaj donacoj,

dank'al ili ni ankoraŭ rezistas.










BIERUMU !!!

Estrella

Damm

# FESTO





STRATA, NOKTA SARDANO!




Ha!
Kiuj festegoj;
Tendarejen, strate, en la vilaĝa junulejo... ĉie... ĉiam estis festoj!*
Tio ja vere estis halucinindaĵo; muziko je ĉies gusto... de Hertzainak, Skatalà, Kortatu ĝis Lluís Llach, Joan Manel Serrat, El último de la fila, Cantores de Híspalis, kaj la tendara atrakcio: !!!
GORGORITO ...





FOTO Y FAR ARNAU TORRAS

# JESÚS*

*NOTO: LAŬ PROPRA VOLO PREFERAS "JESÚS" ANSTATAŬ "JESUO".

## NE ADIAŬ

## SED

## ĜIS BALDAŬ

## NATXO,gasteiz

Dum la HEJS-Tendaro,mi konis la decidon de Jesuo kabei ; mi ne kredas, ke Jesuo kabeu, ĉar kabeo estas tre malĝoja kaj serioza afero.

Jesuo estis laborante por Esperanto-tre forte-, de ĉi tie mi volas danki al Jesuo lian daúran penadon favore al nia bela ideo.

Mi komprenas lin ; troa laborado,kaj malmutaj rezultoj,kaj eĉ pli dolore,miskompreno aú moralaj batoj,kaj esti celo de ĉiuj pafoj en la nekompreneblaj aferoj en la katalluna Esperanto-movado.

Ĉiamaniere,-mi kredas-,ke Jesuo lasas siajn oficialajn laborajn postenojn en la movado,sed devas daúri esti simpla esperantisto, malgraú ke ne aktivulo...sed la lingvon,la ideojn,la internacian amikecon,la bonajn spertojn vi ne devas lasi.

Tutkore,mi volas danki al vi vian amikecon, vian afablecon,kaj ankaú animigi vivi,ami kaj festi,-kiel ĉiam Esperante-.

Jesuo,ne adiaú,sed ĝis baldaú

Naĉo Apaolaza